Theodor Storm,

Sendorme

tradukita de Manfredo Ratislavo

Kun timo vekiĝis mi el sonĝad';
Aŭdiĝas dumnokte alaŭda kantad'!

Jam iris la tago, forestas maten',
Sendorme mi kuŝas sur mia kusen'.

La kant' de l' alaŭdo, plusonas ĝi;
Ho voĉo de l' tago, angoras mi!

Traduko de la Germana poemo "Schlaflos" de THEODOR STORM *(Teodoro Stormo, ∗1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1983.*

Arg-177-358 (2004-02-23 22:19:08)